

Atentu esperantistoj ! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtonda Radiostacio pri la vivo en Esperantujo.

Salutis nin per Poŝtkartoj el Strasburgo (Francio) fraŭlino E. Dietz kaj el Fürth (Germanio) sinjoro Bruno Siegert. Al ambaŭ aŭskultantoj ni sendas per la ondoj niajn plej korajn salutojn.

Tiun ĉi someron, kiel multaj samideanoj, ni veturis eksterlanden. Ni vizitis Nordan Italion kaj havis la okazon prelegi ĉe du Esperanto-Grupoj. En Komo antaŭ vigla grupo de 24 gesamidenoj mi prezentis la Prahistorion de Ruĝa Kruco kaj en Vicenza mi klarigis la penson de Edmond Privat antaŭ grupo de 20 tre interesataj geesperantistoj kaj 5 nov-varbitoj, por kiuj miaj diroj estis resume italogitaj. La monato julio ne tre bone konvenas, kaj ĉefe en varmega suda lando, por tiaj prelegvojaĝoj, pro tio mi ne havis la okazon viziti aliajn grupojn. Mi tamen povis plian fojon konstati la neceson pri regulaj inter-klubaj kontaktoj. Eble hodiaŭ min aŭdas samideanoj el tiuj urboj. Mi do devas atenti ne diri malveraĵojn. Dum en la unua urbo mi konstatis, ke la kunsidoj estis tre regulaj kaj vigle interesaj kaj variaj, en la dua tuj je mia alveno mi sentis, ke bedaŭrinde kontakto kun Esperantujo mankis. Dum la diskuto, kiu sekvis mian paroladon, esprimiĝis vera deziro pri plibonigo de la grupa kultura vivo. Kiam mi ekzemple citis librojn, oni demandis, kie ili estas aĉeteblaj. La novaj esperantistoj ne sciis, ke regule radio-elsendejoj uzas nian lingvon, kaj klubano flustre diris al mi, ke de unu jaro bedaŭrinde ne plu okazis kunveno. Mi do esperas, ke mia trapaso en tiu urbo Vicenza realportis iom da viglo al sveninta grupo.

Mi mem, kiel prezidanto de la grupo en La Chaux-de-Fonds, bone konas la malfacilaĵojn, kiuj sin prezentas, kiam oni deziras aranĝi regulajn kaj ĉiam intereso-plenajn kunvenojn.

Mi unue konstatis, ke oni ne povas akordigi la dezirojn de la progresantoj kun tiuj de la komencantoj. Kiam ekzemple okazas nur unu kunveno en la monato, la progresantoj ĝenerale enuiĝas pro la ĉeesto de komencantoj. Se oni solvas tiun problemon favore al la lertaj klubanoj, tre baldaŭ la grupo reduktiĝas al kelkaj babilemaj membroj. Se kontraŭe oni konstante rekomencas la samajn simplajn programerojn por helpi la komencantojn, la bonaj esperantistoj laciĝas, trovas ĉiuspecajn kialojn por ne povi ĉeesti la kunvenojn, aŭ se ili venas, ili tion faras pro devo, pro fideleco. Ĝenerale tiam la krokodilado fariĝas la regulo de la kunvenoj. Kaj ĉiuj havas impreson stagni.

Verŝajne absolute ne eblas progresigi grupon organizante nur po unu kunvenon monate. Kiel sekretario de Esperanto-Edukistaro de Svislando mi havas okazon aŭdi multajn plendojn pri la kultura nivelo de niaj grupoj, kaj mi ofte havas la impreson, ke estus pli bone por nia movado, ke en iuj lokoj ne ekzistu plu Esperanto-grupoj, ol fantomoj eterne duonvivaj.

En ĉiu lando devus ekzisti kontrolo pri la aktiveco de la lokaj grupoj. Mi ne scias, se tio jam ekzistas en aliaj landoj. En Svislando Esperanto-Edukistaro komencis rikolti ĉiujn grupajn informilojn. Tio permesis konstati, ke en iuj lokoj, kie ekzistas surpapere grupo, dum tuta jaro absolute nenio okazis. Oni simple devus malpermesi pluan ekzisto-raĵton al tiuj kluboj. Aliaj grupoj kontraŭe havas viglan kaj interesan vivon. Kutime ĉe ili okazas almenaŭ po du kunvenoj monate, la unua el ili ĝenerale estas lingve kaj kulture altnivela, ĝi interesas la lertajn esperantistojn, kiuj en ĝi prezentas raportojn pri siaj feri-vojaĝoj, prelegojn pri sciencaj aŭ literaturaj temoj. Se okazas lingvo-klarigoj, ili nur povas interesi tre lertajn esperantistojn. La dua kunveno de la monato estas por la komencantoj, simpla programo estas prezentata en esperanto. Krokodilado estas tolerata. Oni prezentas diapozitivojn, aranĝas kontaktvesperojn kun aliaj movadoj, kies okupoj tuŝas al la internacia vivo. La karaktero de tiu dua kunveno estas ĉefe eduka, pedagogia.

Tre ofte kiam funkcias tiuj du kunvenoj troviĝas ĉe la prezidanteco de la klubo samideano vigla kaj ideo-plena. Tre ofte li mem estras ambaŭ programojn, kelkfoje li havas helpanton.

Mi konstatis, ke la vivo de grupo antaŭ ĉio dependas de la personeco de la prezidanto. Ne sufiĉas elekti altrangulon, aŭ edukiston, aŭ riĉulon, aŭ personon, kiu havas multajn ideojn. La ĉefaj kvalitoj por Esperanto-Klubo estas kuraĝo, iniciatemo, instigemo kaj insistemo.

Kio ankaŭ ofte mankas al niaj grupoj, tio estas labor-programo. La vesperoj tro ofte estas improvizitaj. Subite dum du monatoj ne plu okazas kunvenoj. Oni komencas agadon, kiun oni poste forgesas daŭrigi. Por renkontiĝoj oni nur anoncas babiladon.

Du grupojn mi vizitis tiun ĉi someron. Gratulojn mi diras al tiu de Komo. Oni sentas, ke ĉe ĝi io vivas, progresas. Ĝi estas vere kiel laboratorio, kie naskiĝas nova tutmonda kulturo. Kaj en Vicenza, mi esperas, ke post mia vizito oni decidis reaktiviĝi. Kuraĝon, samideanoj, vi entreprenas malfacilan laboron. Sed samtempe vi malkovros, ke tiu laboro alportas riĉecojn, ĝojojn kaj amikecojn ne facile troveblajn ekster Esperantujo.

Ni reparolos pri tiu temo dum venonta elsendo, kaj tre ŝatus povi raporti pri la esperanto-vivo en multaj kluboj. Skribu al ni pri tio.

Vi aŭdis Radio-Svislandon. Claude Gacond parolis pri la vivo en Esperantujo.

Ĝis reaŭdo !

-oOo-